30-gr

3-a Jaro. N-o 143 APERAS SEMAJNE 25. Junio 1927



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanty

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

AZIO RIBELAS

Rilate Azion, aŭ, pli ĝuste, la proksiman kaj malproksiman Orienton, en eŭropa literaturo ekzistis ĝis nun du vidpunktoj. Unu el ili, pli malnovan kaj pli disvastigitan, kreis la legado de biblio, de "1001 noktoj" kaj la meditema rigardado de ĉinaj brodaĵoj sur silko kaj de desegnaĵoj sur porcelanaĵoj. Laŭ tiu ĉi vidpunkto, la Oriento estas pitoreska, brila, majesta, romantika, multkolora kaj en ĉio mala al Eŭropo. La proksima Oriento estas senfina vico da poetoj, da saĝuloj, ĉiuminute eldirantaj aforismojn, da malkontentaj eŭnukoj, da gajaj portistoj, kiuj ĉiam havas eblecon dum unu horo fariĝi ministroj. Plue, memkompreneble, la Oriento estas aro da belegaj, enamiĝemaj virinoj, ŝanĝemaj kiel mara ondo, — virinoj kun abisme senfundaj okuloj substrekitaj per cinabro...

La recenzistoj de tiu speco, kiun la filozofo Voltaire senrespekte nomis *"Les excréments de la littérature"* (fekaĵoj de literaturo), kritikonte libron pri Oriento, nepre atendis kaj esperis, ke la aŭtoro, de la unua paĝo de sia verko, transportos ilin en 1001 noktojn, en la malnovan testamenton, aŭ almenaŭ en fabelon de Andersen "La Najtingalo". La libro estis taksata nur laŭ pitoreskeco de ĝiaj koloroj. Tia estas la unua vidpunkto.

La alia vidpunkto estas mala. La Oriento, laŭ ĝi, estas malpura, malpoezia, neklera, malbela, mensogema, ĉifonvestita, — la Oriento estas grandega, abomena flikaĵo el maldelikata kamelteksaĵo, metita sur senkoloriĝintajn silkĉifonojn. Laŭ difino de Colridge, "la Oriento estas lando de sepdek du malbonodoroj".

La ambaŭ vidpunktoj konsideras la Orienton senmova, rigidiĝinta, tute malkapabla adopti la okcidentan kulturon. Kaj tial, ke la Oriento neniam povos ekposedi la okcidentan teknikon, ĉar ĝia orienta menso estas speciala — meditema, mistika, revema, — la sorto mem destinis, ke Eŭropo regu Azion.

La unua, kiu rompis ĉi teorion, estis Japanio. Post la mondmilito ĝin sekvis la proksima Oriento kaj Ĉinio. Videble, Ĉinio neniam estis "senmova", kiel oni kutime pensadis; aliel estus tute maleble klarigi la multjaran civitan militon, konatan laŭ nomo de "ribelo de tajningoj", dum kiu pereis preskaŭ 20000000 da homoj. Tiam unu parto de Ĉinio proklamis militon al alia. Nun, ekposedinte la okcidentan teknikon, Ĉinio proklamis militon kontraŭ Eŭropo kaj, speciale, kontraŭ Anglio. Pri tio parolas en sia libro la konata usona ĵurnalisto Upton Clous (pseŭdonimo de Joseph Washington Hall).

La titolo de la libro estas: "Ribelo de Azio, aŭ fino de regado de blankhaŭtuloj super la mondo". Ĝi estas bildo de ĉiniaj revoluciaj movadoj, bildo pentrita de homo simpatianta al la liberiĝaj tendencoj. Laŭ vortoj de l' aŭtoro, la anglia imperialismo estas jam laŭmerite punita en malproksima Oriento. Tie ja ĉio estas bazita sur aŭtoritato. La aŭtoritato de Britio estis senlima. Sed nun ĝi... forvaporiĝis. Tio okazis, kiam la striko de kulioj kaj la bojkoto igis Gong-Kong'on subiĝi. La horo de morto por britia imperialismo sonis de malproksimorienta horloĝturo, kiam la ĉinia homamaso, sekvate de l' kantona armeo, forprenis de angloj ilian koncesion en Hankeu kaj kiam Ĉang-Tso-Lin forkurigis la superan anglan ĉefinspektoron el pekina doganejo. La aŭtoro longe vivis en Ĉinio kaj intime konatiĝis kun la movado. Upton Clous asertas, ke tiu movado estas ne nur ribelo de Ĉinio kontraŭ eŭropa imperialismo, sed ĝi estu ĉefe likvido de la tuta *malnova* Oriento. La malnova ĉinia pacifismo ne havas plu lokon en la movado. La militisto ne estas plu pariao[1]), sed popolheroo, defendanta la landon kontraŭ fremdlanda imperialismo. La nova Ĉinio nuligos ĉiujn maljustajn kontraktojn diktitajn de l' eŭropa kapitalistaro, malebligos al ĝi kontroladon de la fontoj de ĉiniaj ŝtatenspezoj. La nova Ĉinio forlasos arĥaiĝintajn kutimojn, neos egale la religion de Konfucio kaj la kristanismon. Ĝis la lasta tempo la ĉinia socio baziĝis sur fideleco de individuo al sia mastro, al sia familio. Nun tiun fidelecon anstataŭis partia lojaleco.

Kiam la tiel nomata "kristana generalo" Feng perfidis sian estron Vu-Pej-Fu kaj rifuzis helpi al sia protektinto kaj bonfarinto, prezidanto Teao, — la malnova Ĉinio estis terurigita. Sed la junaj estroj, edukitaj eksterlande, diris: "Li estas prava. Se homo baras la vojon kaj malhelpas la movadon, oni devas forigi lin senkonsidere al liaj antaŭaj meritoj."

En Ĉinio nun estas farataj kuraĝaj sociaj eksperimentoj kaj la penso intense laboras. Ĉiuj konvenaĵoj, ekzistintaj de la epoko de Konfucio, estas nun forigitaj. La junularo ekribelis kontraŭ kontrolo de gento pri individuo, kontraŭ patriarka familiordo. Estas nun ofte praktikataj la tiel nomataj "provaj geedziĝoj". La nova filozofio instruas estimi personon nur

---

[1]) Homoj de la plej malalta klaso tiel nomataj malestime en Hindio. La vorto troviĝas en vortaro de la "Presa Societo". — *N. de la Red.*

depende de ĝia utileco al komuna afero. La junularo nun scipovas akceptiĝi per strikoj siajn dezirojn.

Resume el la libro de l' usona ĵurnalisto oni konkludas, ke: 1. la ribelo de Azio kontraŭ Eŭropo sendube ĉesigos la diktatorecon de la blanka raso; 2. oni vokas nin al Oriento por pristudi ĝin, dum la Oriento mem forlasis ĉiujn siajn tradiciojn kaj fariĝas "okcidenteca", por liberiĝi el la eŭropa influo; 3. dum tiu procedo la Oriento simiLiĝas al Eŭropo, perdas siajn naciajn trajtojn kaj el *naciisma* movado rezultos nova paŝo al *sennaciismo.*

2043 laŭ artikolo de *Dioneco.*



TAGO EL MIA VIVO

Mi estas unu el la 40 000 loĝantoj de la urbo Peterborough, kiu troviĝas 130 km. norde de Londono kaj kies ĉefindustrioj estas brikfarado kaj maŝinkonstruado.

Mi havas 26 jarojn kaj estante ankoraŭ fraŭlo, mi loĝas kun du aliaj fraŭlaj laboristoj ĉe iu militvidvino, kiu prizorgas niajn manĝojn ktp. La loĝejo estas 6-ĉambra brika domo, malantaŭ kiu troviĝas ĝardeno enhavanta florojn, legomojn, fruktarbetojn kaj kokinejon.

La vekhorloĝo ĉiumatene vekas min ĉirkaŭe la 6.15 h. kaj ellitiĝinte mi studas dum duonhoro kaj poste matenmanĝas. Je la 7.30 h. mi biciklas al la laborejo, kiu troviĝas ĉe l' rando de l' urbo je 1½ km. de la loĝejo. Tiu laborejo estas maŝin-konstruada fabriko, kie oni konstruas maŝinojn por panfarado, vestlavado, ĉokolad-rafinado, kaŭĉuk-purigado ktp.

La laboro komenciĝas je la 7.45 h. kaj je la 12.30 h. ni rapidas hejmen por tagmanĝi. Leginte eventualajn leterojn kaj gazeton, mi tagmanĝas kaj denove biciklas al la fabriko. Posttagmeza laboro daŭras de 13.30 h. ĝis 17.30 h. Mi laboras kiel seruristo. Same kiel Petro en la SAT-lernolibro, "jen mi svingas martelon, jen mi boras, jen mi fajlas, jen mi estas seganta la feron".

Ni ĵus finkonstruis pan-faradan maŝinaron por iu bakejo en Leningrad, sed, rezulte de la azena agado de nia registaro, ni ne povos fari pluan laboron por Sovetio. Multaj anglaj metalistoj pro tio fariĝos senlaboraj.

Reveninte hejmen vespere, mi demetas la olemakulitajn laborvestojn kaj temanĝas. Kiel freŝe estas senti sin pura kaj malvarmeta! Vesperojn mi pasigas jen ĉeestante sindikatan aŭ esperantistan kunvenon, jen bicikle rajdante en la kamparo, jen laborante en la ĝardeno, jen vizitante kinejon aŭ teatron. Iom noktomanĝinte, mi enlitiĝas ĉirkaŭe la 22.30 h.

Sabate nia laboro finiĝas je la 11.00 h. kaj posttagmeze mi faras kelkajn proprajn necesajn laboretojn kaj aĉetojn.

Dimanĉe ni ne laboras. Matene, dum somero, mi ordinare partoprenas en esperantista bicikla ekskurseto en la kamparon. Veturante ni ekzerciĝas en esperanta interparolado. Posttagmeze mi iafoje ĉeestas laboristan kurson, kie ni



studas ekonomion, historion ktp., kaj vespere mi ofte respondas al miaj esperantistaj korespondantoj.

Jen kiel pasas mia ĉiutaga vivo, iom malvigle, en tiu-ĉi konservema katedrala urbo.

R. Hall. — 7145.



EL FINNLANDO

La burĝaro daŭrigas siajn fiagojn kontraŭ la proleta klaso

Post la jaro 1918 suferis la Proletaro de Finnlando pro malvenko en "Liberiga milito"[1]) kaj pro ties rezultoj, kiuj eble jam estas konataj en ĉiuj partoj de l' mondo.

La venkintoj fanfaronas, ke ili per la fratmilito liberigis la landon de l' rusa superregado, sed la vero estas, ke ilia celo estis pereigi tiaman fortan proletan movadon en la lando kaj, por sukcesi en ĝi, ili estis pretaj vendi la landon al la monarĥista Germanio, eĉ lasi ĝin al la superregado de tiama Germanio per elekto de reĝo (german-devena), el familio de Hohenzollern'oj. Dank' al malvenko de Germanio en la mondmilito kaj dank' al germana revolucio, la proletoj de Finnlando havis eblecon vivi kaj ree plifortiĝi, ĉar tiuj okazaĵoj vanigis la planojn, tre abomenajn kaj perfidemajn, de la kapitalistaro finnlanda.

Nun, post naŭ jaroj da tiu terurega "blanka teroro", kiu tiam furiozis tre mortige por la laborista klaso, oni povas konstati, ke proleta movado en nia lando estas nun preskaŭ pli forta, ol neniam antaŭe. La membraro de finnlanda Sindikat-Unuiĝo, post la unua kvarono de ĉi jaro, estis 67 899 kaj nur dum la nenormala jaro 1917 la nombro estis pli alta. Ĉi tio atestas resaniĝon de ricevitaj vundoj, tre malfacile resanigeblaj.

Dum la tuta jaro la Proletaro de Finnlando sukcese batalis por plibonigi sian mizeran vivnivelon, ankaŭ ĉi jare oni povas konstati la samon.

Nialanda aroga kapitalistaro kun teruro vidas la pliportiĝon de siaj sklavoj kaj pro tio ĝi revas revenon de l' tagoj de 1918, por ke ĝi havu okazon sendi per pecetoj da plumbo siajn kontraŭulojn al la ĉielo aŭ sekigi ilin per malsato inter dornfadena barilo, kiel ĝi kutimis tiam.

La 21. 5. 1927 la metalkapitalista unuiĝo de Finnlando komencis la atakon per la laborĉesigo en siaj fabrikoj. Pli ol 10 000 metallaboristoj estas ĵetitaj surstraten. Kun ili suferas ĉirkaŭ 30 000 iliaj familianoj. Ĉio ĉi nur pro la kaprico de faŝisma arogemo! La motivo de l' ago estas evidente nevera. En la urbo Turku strikis en du fabrikoj ĉirkaŭ 500 metallaboristoj jam pli ol tri monatojn kaj ili celas havigi 1—1.50 f. mk. plialtigon al siaj, ĉe la limo de malsateco estantaj, horsalajroj, kiuj meznombre estis 5.50 f. mk. hore. La fronto de la strikantoj estas fortika, ili konscie batalas por akiri en sia kruela situacio etan plibonigon.

La atako de kapitalistoj celas ne nur la strikantojn. La ĉefa intenco estas piedpremi vekiĝantan proletan movadon en la lando, ruinigi la sindikatojn, k. c. proletajn organizojn. La kapitalistaro ne konsideras la sindikatojn egalvaloraj kun siaj organizoj.

La proletoj de Finnlando estas konsciaj pri tio, ke nun komencis la kapitalistaro sian atakon kontraŭ tuta klaso laborista, tial ili unuanime, morale kaj finance subtenas siajn fratojn batalantajn.

Estas verŝajne, ke por akiri la finan venkon, ni estos devigataj translokigi la plej kompetentajn profesiulojn eksterlanden. La afero ne estas ankoraŭ fine decidita, sed ĉiuokaze tia spirito regas en la rondoj de la laborĉesigintoj kaj evidente estas, ke finnlanda Laboristaro, per ĉiuj rimedoj subtenos K-dojn, kiuj estos pretaj translokiĝi.

Ni kuraĝas esperi, ke K-doj en ĉiuj landoj, ĉiel helpos translokiĝantojn, esprimonte la solidarecon de la internacia Proletaro. Ankaŭ ni esperas, ke Kamaradoj SAT-anoj sendos salut- kaj instigleterojn al jena adreso: Suomen Metalliteoblisuustyontekijain Liitto, Helsinki, Finnlando, por montri la valoron de la internacia lingvo, kiel batalrimedo kontraŭ la tutmonda kapitalistaro.

Unu por multaj.

[1]) La venkintoj nomas la militon "liberiga"! Saman rajton havas ja proletoj, ĉar ilia celo estis sin liberigi el la ĉenoj de l' rabanta kapitalistaro, kvankam ĝi ĉi foje ne sukcesis.

Se ĉiu ekstersovetia SAT-ano sendos semajne unu interesan leteron en Sovetion, la nombro de sovetiaj esperantistoj baldaŭ dekobliĝos.

INFANECO DE LENIN

Artikolo, skribita de instruisto de Lenin, K-do V. A. Kalaŝnikov

Rimarko: *Ni atentigas ĉiujn K-dojn, perantajn niajn artikolojn al jurnaloj, pri tiu ĉi artikolo, ĉar similaj materialoj tre malofte trafas niajn manojn.*

De l' tradukinto: *En Smolensk (Sovetio) loĝas K-do Kalaŝnikov, 72-jara instruisto. Tiu ĉi K-do estis bona amiko de gepatroj de Lenin, kaj en 1876 jaro instruis ABC-on al Lenin mem. Nun K-do Kalaŝnikov estas ano de prezidantaro de Tutsovetia Asocio "For analfabetecon!", kiu celas alfabetigi tutan loĝantaron de Sovetio, restintan analfabeta dum la cara reĝimo. Ankaŭ K-do Kalaŝnikov, malgraŭ sia maljuneco,* persone gvidas lernejon kaj instruas alfabeton al analfabetaj laboristoj. *Li ankaŭ treege favoras esperanton kaj pro influo de Smolenskaj esperantistoj antaŭnelonge komencis lerni esperanton. Pro peto de Smolenskaj esperantistoj li skribis ĉi suban artikolon kaj promesas la duan skribi jam en esperanto.*

R. Nikolskij, *Smolensk.*

Mi konatiĝis kun Jlja Nikolajeviĉ Uljanov (patro de Lenin) en 1870 jaro, kiam li ĵus ricevis la postenon de lerneja inspektoro en Simbirska gubernio kaj vizitis lernejon, en kiu mi mem lernis. Kaj mi nepre volas diri kelkajn vortojn pri persono de tiu ĉi eminenta, honesta homo, patro de l' gvidanto de Tutmonda Proletaro.

J. N. Uljanov estis tre ĝentila kaj bonkora homo. Oni pravas nomante lin patro de klerigo en Simbirska gubernio, ĉar nur dank' al li ricevis klerecon ĉuvaŝoj, malgranda nacio, loĝanta en tiu regiono kaj subpremita de la cara registaro.

Kiam J. N. Uljanov alveturis Simbirskon, en la gubernio estis nur kelkaj lernejoj, posedataj de bienuloj kaj troviĝantaj en terura stato. La lernejoj troviĝis en simplaj kamparanaj domoj, kune kun porkidoj, bovidoj kaj aliaj hejmbestoj kaj brutoj. Instruis en la lernejoj — estintaj oficistoj aŭ oficiroj-ebriuloj, suboficiroj, policistoj, pastroj. Vi povas imagi, kian klerecon donis al la loĝantaro tiuj "instruistoj". Bienuloj kreis la lernejojn nur, por ke tiuj preparu por ili bonajn skribistojn, kalkulistojn, librotenistojn, pastrojn, policistojn. Rezulte kamparanoj mem ne volis, ke iliaj filoj (nur filoj, ĉar filinojn oni tute ne instruis) lernu, ĉar ili estis certe konvinkitaj, ke "kiu scias ABC-on, tiu estas fripono".

J. N. Uljanov komencis tute aliel konstrui la laboron. Anstataŭ friponoj, li donis novajn, verajn instruistojn, li kunvokis la unuan en tuta Rusio gubernian instruistan konferencon, li mem persone instruis en kelkaj lernejoj, kaj dank' al liaj konstantaj penado, klopodado kaj petado en la gubernio aperis ĉirkaŭ 500 novaj lernejoj.

En persona vivo li estis tre modesta kaj konscia homo, vera amiko de l' laborularo. Pro tio ĉiuj liaj gefiloj estis revoluciuloj: krom Lenin mem, ĉiuj rusoj konas du maljunajn aktivajn komunistinojn — fratinojn de Lenin — Anjon kaj Marion, kaj la plej aĝa lia frato Aleksandro estis mortigita pro atenco kontraŭ imperiestro Aleksandro II-a. J. N. Uljanov mem ankaŭ estis revoluciema homo, kaj pro tio oni malamegis lin, malhelpis en lia laboro, klaĉis kaj eĉ post 25-jara laboro donis al li pli malgrandan pension, ol li rajtis ricevi.

Jen kia estis la patro de Lenin. Kaj printempe en 1876 jaro mi konatiĝis kun Lenin mem, kiu estis tria filo en familio de Uljanov. En 1876 jaro Vladimiro (nomo de Lenin) estis nur sesjara knabo (li naskiĝis 22-4-1870). Sed malgraŭ sia juneco li jam povis bone legi kaj estis tiom serioza, ke li diris al sia patro, ke li volas lerni ĉe la sama instruisto, kiu instruis liajn pli aĝajn gefratojn Alecjon kaj Anjon, kiuj jam studis tiam en lernejo. Aŭtune la patro proponis al mi, instrui Vlaĉjon en lia loĝejo. Mi memoris, kiel la vartistino portis ankoraŭ en manoj Vlaĉjon, envolvitan en infanan litkovrileton, sed mi sciis, instruante pli antaŭe aliajn gefilojn de Uljanov, ke ili en tre juna aĝo fariĝas konsciaj kaj lernemaj pro bona edukado de gepatroj. Tial mi ne miris instrui sesjaran infanon.

Mi bone memoras miajn unuajn impresojn pri lecionoj al Vlaĉjo Uljanov. Infana klastablo estis starigita en mezo de l' ĉambro kaj, kiam mi venis, Vlaĉjo jam sidis ĉe la tablo kun libroj, kajeroj kaj skribtabulo. Li estis vestita per rozkolora, kun strioj, ĉemizeto. Sur lia kapo troviĝis, kvazaŭ ĉapo, aro da bukliĝantaj kaj falantaj al frunteto blondaj, iomete ruĝflavaj haroj. La okuloj estis brunetaj, preskaŭ samkoloraj kiel la haroj, kaj rigardis ĝojeme kaj kuraĝe. Pli supra lipeto iomete antaŭenis sanece kaj forte. Ĉio ĉi aspektigis lin tre serioza, ne konvene al lia aĝo.

Dum lecionoj li ĉiam estis tre atentema, pri nenio deflankiĝis kaj ĉiujn klarigojn komprenadis tuj, kvazaŭ li jam sciis tion pli antaŭe. Memoro lia estis tiom bona, ke li neniam bezonis ripeton de klarigoj. Bonaj kaj kapablaj lernantoj estis aliaj infanoj de Uljanov, sed tiu ĉi Vlaĉjo ŝajnis esti pli forta laŭ la korpstato kaj laŭ la penskapableco. Finfine lia seriozeco kaj komprenemo eĉ fariĝis por mi iom suspektindaj. Mi opiniis, ke eble la gepatroj tro progresigas lin, aŭ lin ĝenas mia ĉeesto. Sed unufoje dum la leciono li mokimitis mian malrapideman, preskaŭ po silaboj, elparoladon de rusaj vortoj, al kiu mi alkutimiĝis, instruante en ĉuvaŝa lernejo, por ke la lernantoj-alinacianoj alkutimiĝu al ĝusta elparolado de rusaj vortoj. Tiam mi konvinkiĝis, ke li estas libera de ia ajn premo, ke li havas fortan, memkonfidan karakteron, kaj li estas serioza nur pro tro frua maturiĝo. Kaj li, kiel mi aŭdis, estis tre vigla dum la luktado. Do, li agis laŭ sia propra regulo: se lerni — lernu, se ludi — ludu.

Alvenis aŭtuno. Kotkovriĝintaj stratoj igis mian vizitadon al Uljanov tre malfacila, ĉar mi loĝis en tre malproksima parto de l' urbo. J. N. Uljanov komprenis tion kaj, ne volante ĝeni min, li trovis por mi aliajn pagatajn lecionojn, pli oportunajn por mi, kaj Vlaĉjon komencis instrui alia instruisto, kiun Vlaĉjo mem vizitis.

La lastan fojon mi vidis Vlaĉjon, kiam li estis dekdujara. Mi renkontis lin sur strato, kun fiŝkaptiloj en manoj. Li tre rapidis, timis malfruiĝi kaj, ekpetinte pardonon, forkuris.

Kiu povis imagi tiam, ke tiu ĉi modesta, serioza knabo estos gvidanto de l' Tutmonda Proletaro?

V. A. Kalaŝnikov.

Noto: Ni petas ĉiujn K-dojn, sendi po 2 ekzempleroj de ĉiu jurnalo, en kiu aperos tiu-ĉi artikolo, laŭ adreso: K-do V. A. Kalaŝnikov, Poŝtkesto 72, Smolensk (Sovetio).

JE LA NOMO DE L' VIVO

Filozofi-lirikaj Fragmentoj
Originala verko de nia K-do **E. Izgur**
Enkonduko de **E. Lanty**
Antaŭparolo de **N. Kruĉinin**
Prezidanto de Tutukrainia Asocio de Proletaj Verkistoj kaj Prezidanto de Tutukrainia "Proletkult"
224 paĝoj, 13,5×18 cm, abunde ilustrita

—o—

Jen kion diras la kritiko:

"Se Izgur venus en la verkistan rondon kun tiu ĉi verko kiel unua produktaĵo de lia talento, ĝi sola sufiĉus por loki lin sur la unuan vicon de plenkonsciaj eminentuloj, sed Izgur jam donis al la homaro multajn aliajn similajn trezorojn kaj lia lasta verko estas plia ŝtupo en lia pilgrimado al la vero kaj lumo. Ĉiu fragmento de "Je la nomo de l' Vivo" valoras pli multe ol tutaj verkoj de aliaj aŭtoroj, kies plumoj bele rakontas, bele priskribas sed nenion diras. Ĉiu frazo de Izgur estas sentenco, ĉiu lia sceno prezentas la mizeron de la homaro tiel longe baraktanta por liberigi sin de tiel diversspecaj katenoj..." — Saljo.

(Kataluna Esperantisto)

—o—

Havebla ĉe nia Administracio:
Colmstrasse 1, Leipzig O 27

Prezo: klasika eldono: bonega papero,
bela kovrilo . . . . 2.— mk.
luksa eldono: . . . . . . 2.50 mk.

MAKEDONIO

La lando de larmoj kaj suferoj

La vivo de la popolo makedonia, kies batalo pri la libero dum jardekoj estas tutmonde konata, — nuntempe prezentas nur suferojn kaj larmojn. Bedaŭrinde, ĝis nun tre malofte oni aŭdis en esperantista gazetaro ion pri ĝi. Tial en malsupraj linioj, ni penas doni al la legantaro, kiom eble pli veran, koncizan priskribon pri la vivkondiĉoj en ĉi malfeliĉa lando, troviĝanta nun sub duobla jugo: ekonomia kaj nacia.

Ekonomia stato

La lando estas ekonomie ankoraŭ nedisvolvita. Fabrikoj, granda industrio — ne ekzistas, sekve ankaŭ la Proletaro, je marksisma senco de la vorto, ne ekzistas. Antaŭ milito, la popolo grandamase elmigradis Amerikon, Bulgarion, Rumanion, kaj alien, laborante tie kelkajn jarojn kaj poste revenante hejmen. Sed nun, de kiam la lando falis sub serban jugon, estas malpermesata la elmigrado. Tial mizero pligrandiĝis, ĉar la popolo ne havas laboron. Multaj turnis sin al produktado de tabako, sed ĉar ekzistas ŝtata monopolo, ĝia prezo estas tre malalta kaj ne sufiĉas por la subteno de la plej mizera vivo de ĝiaj produktantoj. Aliuj, ekzemple la metiistoj, laboras 16—18 horojn tage, sed tamen apenaŭ vivaĉas. Plej malfeliĉa estas la sorto de la laboristoj. Plej grandaj laborejoj, kiuj havas pli ol cent laboristojn, estas la laborejoj de ŝtata monopolo. Tie estas grandparte okupataj junaj laboristoj. La labortago estas 10-hora. La salajroj estas proksimume 20 dinaroj[1]) tage. Alie, ĉe la privataj laborejoj, oni laboras por 10—8 eĉ por 5 dinaroj tage. Tie labortago dependas de la volo de majstroj, t. e. iafoje 15 sed iafoje ĝi plilongiĝas ĝis 18 horoj.

Kun tiom malaltaj salajroj, ĉe tia kareco de vivproduktoj, oni povas imagi, kia estas la vivo de ĉi malfeliĉuloj! La salo kaj papriko estas ilia plej ofta nutraĵoj[2]). La kamparanoj produktas grenaĵon ktp., sed estas grandskale ekspluatataj flanke de urbaj bankistoj kaj same de la ŝtato mem. La impostoj ruinigas la kamparanaron. Sekve de ĉio, la kamparano makedonia vivas beste. Li produktas ĉion por aliuj, nesciante la guston de siaj produktaĵoj.

La senklereco kaj religiaj superstiĉoj

Senklereco estas komuna. Ĉe malbonega ekonomikondiĉaro, la popolo ne havas ankaŭ eblecon sin klerigadi. Nacia subpremado al tio harmonias, ĉar pro nacia malamo, la makedonoj ne sendas siajn infanojn en serban lernejon. Tre malofte oni finadas gimnazion. En urbo de 25 000 loĝantoj, oni povas trovi en superaj klasoj de gimnazio ne pli ol 30—40 lernantojn. Post lernejo, oni ne kutimas legi ion. Pri la gazetoj oni havas tre malestiman opinion t. e. ke ili multe mensogas kaj ne meritas esti legataj. En urbo de 25 000 loĝantoj nuntempe oni ne povas vendi pli ol 400—500 gazetojn tage. Sed estas interese scii, ke en sama urbo, dum turka reĝimo, kiam estis libere vendataj bulgaraj gazetoj, oni vendis pli ol 7000—8000 ekzemplerojn tage!

La religio en la urboj perdas siajn adeptojn, sed en la vilaĝoj, pro analfabeteco, la religiaj superstiĉoj estas grandaj. Ĉiutage aperadas "sanktuloj", al kiuj estis dum sonĝo "veninta" la ĉiela sendito kaj ordoninta ion por la popolo. Tia "sanktulo" (spirite malsana homo) iras el vilaĝo al vilaĝo kaj sciigas siajn sonĝojn al la vilaĝanaro. Antaŭ nelonge aperis tiaj, kiuj parolis: "al dio estas plaĉinda, ke la popolo ne manĝu viandon, nek fromaĝon, nek ian alian grasaĵon. Ankaŭ dio deziras, ke ĉiu vendredo estu festata same kiel la dimanĉo". Poste, de tiam, la kamparanoj ne laboras vendrede, nek dimanĉe. Oni festadas ĉiun plej malgravan sanktulon kaj nutras sin per nigra sekala pano kaj salo. Tiel, dum tuta jaro sumiĝas ĉirkaŭ 200 festotagoj, kiam oni ne laboras.

La rabemo de ŝtata oficistaro

La oficistojn Belgrada registaro sendas en Makedonion por puno. Tial la makedonoj sentas, ke ilia lando estas konsiderata kiel Siberio dum cara reĝimo. Unujara laboro en Makedonio estas, por pensio, al ĉiu oficisto kalkulata kiel du jaroj. La oficistaro estas grandparte malklera. Speciale la policestraro portas la standardon de senklereco. Sed tial ili estas des pli teruraj kaj krudaj en la konduto kun popolo. Se iu volas fini ian aferon ĉe la juĝo, aŭ en polico, li devas dekfoje pli multe, ol al la ŝtato mem, pagi por ke lia afero estu finita. Plej malfacile estas ricevi pasporton por eksterlando. Tiu malfeliĉulo, kiu ĝin deziras ricevi, devas pagi subaĉetaĵon de malsupre ĝis supre. Kompreneble ĉe tiaj cirkonstancoj neniu kuraĝas iri eksterlanden.

Kamparanaj komunumejoj havas kiel sekretariojn nur serbojn. Ili turmentas diversmaniere humiligitajn vilaĝanojn. Unuvorte la tuta oficistaro havas antaŭ si taskon: veni Makedonion kaj tie kiom eble pli multe rabi monon (popolan sangon) — poste reveni hejmen kaj vivi riĉe.

(Finota.)

[1]) 60 dinaroj = 1 usona dolaro.

[2]) ?... Ĉu la aŭtoro volis diri "salo" aŭ eble lin erarigis la samsona bulgara vorto "salo" signifanta "graso"? — *N. de la Red.*

Loĝejoj kaj popolsano en Hungario

La ĉi subaj ciferoj prezentas interesan kaj karakterizan bildon rilate je la situacio priloĝeja en Hungario:

En tuta Hungario estas 1 175 338 domoj. Inter ĉi tiuj, nur 23 147 (t. e. 1,9%), estas subkeligitaj. Ekzistas parte subkeligitaj 168 690 domoj (14,4%) kaj sen ia subkeligo 983 501 (83,7%). La plej efika defendmaniero kontraŭ la malsekeco de tero estas la izolo de loĝejoj per subkeligo. Kaj eĉ konsiderante, ke en la domoj estas ne nur loĝejoj, sed ĉambroj uzataj por aliaj celoj, tamen 71% el ĉiuj loĝejoj estas senfundamente konstruitaj.

Inter la domoj estas 33 902 (28,4%), kiuj ne havas necesejojn; en la urboj, 19,8% da tiaj. En Budapest, ĉefurbo de la lando, estas ankaŭ 720 domoj sen necesejoj. El ĉiuj necesejoj, estas nur 20,7% fermitaj kaj laŭhigiene faritaj; 79,3% estas tute malfermitaj. Tiuj fermitaj kaj per akvo lavataj, estas nur en la ĉefurbo.

El 2 739 879 loĝejoj, 1 347 962 ne havas artefaritan plankon. Alivorte pli ol la duono el la loĝantaro de Hungario pasigas sian vivon en loĝejoj kun terplanko.

29,4% el la loĝantoj de duĉambraj loĝejoj loĝas pli ol triope en ĉiuj ĉambroj. Ĉi nombro ĉe la unuĉambraj loĝejoj altiĝas je 70,2%. Ne multe pli bona estas la situacio en la urboj, kie 49,3% loĝas en troplenaj ĉambroj.

Konante la influon de troplenaj loĝejoj sur la sanon, ni ricevas tre malĝojigan bildon pri la vivado fizika kaj kultura de la hungaria Laboristaro. *(343)*



Salajroj kaj prezoj

La Internacia Statistika Oficejo publikigas interesajn komparajn tabelojn pri salajroj kaj kostoj de vivnecesaĵoj en diversaj landoj. Ĉar ankaŭ en la sama lando ĉi ciferoj varias de unu regiono al la alia, estas donitaj la ciferoj por la ĉefurboj.

La unu tabelo montras la komparan altecon de salajroj, la dua — la prezon de kelka kvanto da diversaj (sed samaj por ĉiuj landoj) vivnecesaĵoj.

Tabelo I: Salajroj.

1.	Philadelphia	169
2.	Ottawa	143
3.	Sydney	130
4.	Londono	100
5.	Oslo	98
6.	Amsterdamo	88
7.	Stockholm	87
8.	Berlino	69
9.	Parizo	60
10.	Madrido	56
11.	Praha	53
12.	Lodz	52
13.	Bruxelles	52

14.	Milano	47
15.	Roma	45
16.	Riga	45
17.	Wieno	44
18.	Varsovio	43
19.	Tallinn (Reval)	38

Tabelo II: Prezoj.

1.	Philadelphia	2.50	dolarojn
2.	Ottawa	2.03	„
3.	Sydney	2.00	„
4.	Oslo	1.89	„
5.	Stockholm	1.87	„
6.	Londono	1.72	„
7.	Wieno	1.68	„
8.	Madrido	1.68	„
9.	Berlino	1.64	„
10.	Roma	1.56	„
11.	Milano	1.53	„
12.	Riga	1.46	„
13.	Amsterdamo	1.43	„
14.	Praha	1.30	„
15.	Bruxelles	1.26	„
16.	Tallinn (Reval)	1.24	„
17.	Varsovio	1.23	„
18.	Parizo	1.20	„
19.	Lodz	1.07	„

Tiujn ĉi krudajn ciferojn oni povas prilabori per tre interesa maniero, nome: oni trovas rilaton inter la salajroj kaj prezoj en la sama urbo, dividante la ciferojn de la unua tabelo per la koncernaj ciferoj de la dua. Tiam ni ricevos la trian tabelon ĉi sube presitan, kiu montras (tiom, kiom la statistiko montri povas...) la efektivan aĉetpovon de salajroj:

1.	Ottawa	70,4
2.	Philadelphia	67,6
3.	Sydney	65,0
4.	Amsterdamo	61,5
5.	Londono	58,0
6.	Parizo	50,0
7.	Lodz	48,6
8.	Oslo	46,6
9.	Stockholm	46,5
10.	Berlino	42,0
11.	Bruxelles	41,3
12.	Praha	40,8
13.	Varsovio	35,0
14.	Madrido	33,3
15.	Riga	30,8
16.	Milano	30,7
17.	Tallinn (Reval)	30,7
18.	Roma	29,5
19.	Vieno	26,5

Ni vidas, ke, ekzemple, Viena laboristo estas pagata 2,7 — foje malpli bone, ol lia K-do en Ottawa (Kanado). Tre instrua estas la ĉi supre metita rezulta tabelo...

La du unuajn tabelojn afable komunikis al ni K-do *Carlo Jirka, 1574.*



24-hora sistemo de tempokalkulo

Antaŭnelonge en Germanio estas oficiale enkondukita sistemo de 24-hora tempokalkulo. Tio estas ankoraŭ unu paŝo al sennaciismo, ĉar jam de kelka tempo tiu ĉi oportuna sistemo estas adoptita en multaj aliaj landoj.

Por pruvi al multaj germanianoj, kredantaj, ke Germanio estas sola lando enkondukinta la 24-horan sistemon, la malĝustecon de ilia opinio, — mi petas K-dojn el "24-horaj landoj" skribi al mi pri tio. *Esp.-Informejo. Schweidnitz.*

El la laborista vivo en germana urbo Chemnitz

Chemnitz (elp. kemnic) havas ĉirkaŭe 320 000 enloĝantojn, kiuj plejparte laboras en la multegaj fabrikoj troviĝantaj en kaj apud Chemnitz. Ĉefaj branĉoj estas la fer- kaj teksindustrioj.

Salajroj kaj prezoj

La salajroj tute ne atingis la antaŭmilitan aĉetpovon. Semajne nemetiaj laboristoj ricevas 20—30 markojn, metiistoj 30—40 mk., laboristoj, kiuj estas pagataj laŭ laborkvanto ricevas post multa penado 40—50 mk. Virinoj kaj junuloj ricevas 10—20 mk.

El la prezoj mi menciu: Kostas 1 kilogramo da pano tritika 0.45, faruno 0.30, butero 5.00, sukero 0.80, kafo 8.00 mk. Por paro da ŝuoj oni devas pagi 15—20, por vira vestaĵo 60—100 mk., ktp. Ankaŭ la lupago superas la antaŭmilitan nivelon.

Estas do evidente, ke la ŝalajroj kompare al la prezoj estas tre malaltaj kaj ne permesas homindan vivon, des malpli, la laboristaj familioj havas kutime pli ol 2, ofte 5 kaj eĉ pli da infanoj. Imagu la mizeron!

Labortempo

La post la revolucio leĝe enkondukita 8-hora labortago plu ne ekzistas. Revoluciaj malvenkoj kaj sekvinta reakcio ĉiuflanka devigis la Laboristaron rezigni pri la 8-hora labortempo. Nun oni laboregas 9, 10, eĉ pli da horoj tage. Laŭ sindikataj kontraktoj ĉiuj laboristoj rajtas postuli libertempon, kutime 6 tagojn jare. Sed multaj ricevas malpli, eĉ neniom.

La senlaboreco

dum pasinta jaro estis tre granda. Meznombro de senlaboruloj estis 20—25 000. Fine de 1926 denove komencis funkcii la industriaj entreprenoj. Nun nur 3000 senlaboruloj ekzistas, inter ili pli ol 1000 komercistaj kaj teknikistaj oficistoj, kiuj pro raciigo, virina laboro ktp. nur tre malfacile reenoficiĝas. Senlaboruloj ricevas ŝtatan subvencion — laŭ la familiaj cirkonstancoj — 10—20 mk. Ĉu sufiĉe por vivi? Ne demandu!

La sindikatoj

post la revolucio tre fortiĝis, sed, pro la sub "Labortempo" menciitaj kaŭzoj, ege malkreskis. Nun en ili iom post iom ree kolektiĝas la Proletaro. Nur ĉe la oficistoj ankoraŭ burĝaj, eĉ naciistaj metiunuiĝoj havas iom da influo. Kelkaj laboristaj grupoj, ekz. urbaj laboristoj, konstrulaboristoj estas preskaŭ plennombre sindikate organizitaj.

En ĉiuj laborejoj estas komisiitoj sindikataj, kiuj zorgas pri la koncerna Laboristaro. Ankaŭ la leĝa entreprenkonsilantaro estas elektita laŭ propono de la sindikatanoj. Ĝi havas la taskon, kune kun la fabrikestraro plibonigi la laborkondiĉojn en la fabriko, sed nun ĝi ne posedas multajn rajtojn, malgraŭ leĝa protekto ĝiaj anoj ofte estas maldungataj... pro tro kuraĝa defendo de laboristaj rajtoj!

Proletaj partioj

Proleta Chemnitz jam ĉiam estis ruĝa. Ĉe elektoj oni plejmulte balotas por la laboristaj kanditatoj. En la urbokonsilantaro socialistoj havas la plimulton.

Socialdemokrata kaj komunista partioj arigas sufiĉe grandan amason da senhava loĝantaro kaj ankaŭ multnombre organizis la junularon kaj la infanojn en specialaj ligoj. Ekzistas ankaŭ anarkistaj kaj aliaj kontraŭparlamentaj, kontraŭŝtataj grupetoj, sed ili restas sen grava influo. Aperas 2 ĉiutagaj lab. gazetoj, komunista "La Batalanto" kaj socialdemokrata "La Popolvoĉo".

Proletaraj defendorganizoj

Kiam en Saksio formiĝis pure socialist-komunista landa registaro, estis ĉie fonditaj tiel nomitaj "centaroj" por defendi Proletaron kontraŭ faŝismo. Enmarŝis regna militista armeo, malpermesis tiujn organizojn kaj kaptis kaj turmentis la anojn, kie ĝi povis trovi ilin. Poste, pro la pli kaj pli kreskintaj naciistaj ligoj, estis starigita "Reichsbanner" (regna standardo), kiu celas entenigi ĉiujn defendpretajn respublikanojn. Tiuj sufiĉe fortaj grupoj estas uniforme vestataj, ekzercas, praktikas la pafsporton. En Chemnitz la anoj de tiu respublika ŝirmligo estas plejparte socialdemokrataj laboristoj.

Same fondiĝis la ligo de "Ruĝaj frontbatalantoj", kiu celas defendi precipe la proletajn rajtojn. Ĝi entenas ĉefe kompartianojn. Ankaŭ la "Ruĝfrontanoj" dum servo portas unuecan uniformon.

Ambaŭ ligoj per sia disciplino, muzikorkestroj ktp. tre forte efikas ĉe marŝadoj kaj aliaj manifestacioj.

Junulara movado

Kiel jam menciite, ambaŭ proletaj partioj fondis specialajn junularligojn por infanoj same kiel por gejunuloj. En tiaj grupoj la junularo estas edukata por iĝi kleraj klaskonsciaj, revoluciaj homoj, estontaj kuraĝaj klasbatalantoj. Plue ili okupas sin pri novaj vivoformoj, evitas burĝajn, filistrajn kutimojn (drinkado, fumado ktp.), vestas sin prudente, malestimante la "modon". La urba junularo preskaŭ ĉiudimanĉe are migras eksterurben, al la kamparo, kunportante ruĝajn flagojn, kantante revoluciajn kantaĵojn, tiel agante por la liberecbatalo. Ĉe proletaj manifestacioj la junularo okupas la unuajn vicojn.

Same agas la junulargrupoj de la defendligoj. Ankaŭ la diversspecaj sportunuiĝoj laboristaj, kaj kelkaj sindikatoj starigis junulargrupojn. Kompreneble la sporto pleje altiras la junulojn.

(Finota.)

Pensoj pri edziniĝo!

Leginte la artikolon de K-dino 4666 pri edziniĝo, mi opinias, ke ŝi tro ĝeneraligis sian juĝon pri "nia sekso" kaj malprecize konceptas la kaŭzojn de malrapida progreso de virinmovado. Ŝi estas prava, ke filmoj kaj romanoj multe influas knabinojn, sed ĉefe nur en 14 ĝis 20-aj vivjaroj, kiu aĝoperiodo entute ne estas tro serioziga. Dum tiu periodo ankaŭ la knaboj estas entuziasme aventuremaj por "kavaliraj heroagoj", sed tio rezultas ne el karakteraj ecoj de individuo, tio radikiĝas en la ĝenerala burĝeca edukado dumlerneja, krome la literaturo kaj filmarto estas fidelaj servistoj de l' kapitalo, kaj ili efike influas la evoluantan scieman spiriton. Do tio ne estas la reala trajto de la virino kaj la plej multaj virinoj baldaŭ vekiĝas el tiuj revoj kaj ili fariĝas tute bonaj laboristedzinoj. Tiun ŝanĝiĝon kaŭzas ne nur la maturiĝo por naturaj postuloj, sed ankaŭ la vivo kaj ekzistkondiĉoj mem kiuj en la kapitalista sociordo per feraj manoj premas la gorĝon de l' ekspluatataj klasoj, tre serioze instruas al ili, ke pro la ĉiutaga panakiro ili tute ne havas tempon "perdi tempon por edziniĝi" atendante fabrikposedanton, bienulon aŭ dukon ktp.

Ĉu estas mallaŭdinde, se virino klopodas esti bona mastrino? Miaopinie ne tio difinas la nivelon de konscio. Sed male! Oni povas observi, ke ĵus konsciaj virinoj klopodas esti bonaj mastrinoj kaj per tio fortikigi la familian harmonion en ĉi malharmonia mondo, kaj ankaŭ ili estas la plej komprenemaj edzinoj kaj patrinoj. Ili ne nur batalas kune kun la viroj, sed krome ŝanĝas la individuan intereson de la viroj, je *komuna familia intereso* pro kio la batalo fariĝas pli intensa, pli persista.

Jes, ni devas senindulge batali kontraŭ la sensenca vantemo kaj ornamemo kio nur humiligas la virinon je nivelo de ludopupo. Sed ni ne povas kondamni eĉ "el klasbatala vidpunkto" la edziniĝemon de la virinoj, ĝi ja estas biologia destino de ĉiuj virinoj, do naturleĝo. Nenio malhelpas edziniĝintan virinon, veki ĉe siaj kunuloj kaj samseksanoj la konscion kaj klasbatali flanke de vivkunulo.

Sed en la familia edukado ŝia rolo ĝuste el emancipa vidpunkto estas multe pli konsiderinda, ol la plej bele verkita oratoraĵo plena da sensignifaj, sed belsonaj frazoj. Ĉar tie parolas la agoj. Bona klaskonscia patrino kontraŭinfluas ĉe siaj infanoj la efikon de klerikalburĝeca eduko, per kiu oni venenas la koncepteman spiriton de la infanoj kaj ili edukas konsciajn homojn por la homaro. Jam ĉi sola motivo sufiĉas por valorigi la gravecon de edzineco el klasbatala vidpunkto.

Ĝin ni notu. — Ni ne opiniu nin emancipitaj, se kun devizo "egaleco kun viroj" ni forĵetas ĉiujn niajn virinajn ecojn kaj alprenas la malbonajn virajn kutimaĉojn (kiel ekz. fumadi, esti frivole malpruda, malnete aŭ malpurece sin prizorgi, eĉ blasfemadi aŭ drinki) kiel bedaŭrinde ofte ni povas observi tiajn tipojn de miskomprenita emancipiĝo. Tio ne estas egaleco kun la viroj, sed hontigo de virina sekso! Ni liberigu nian spiriton, pens-, sent- kaj agmanieron de enŝtoniĝintaj tradicioj, kiuj nur malaltigas nin kaj humiligas al la estreco de la viro. Ni klopodu esti memstaraj en spiritaj agadoj kaj ni batalu kontraŭ religiemo, patriotismo, naciismo, por reformigo de pedagogia edukado de la infanoj laŭ liberecaj principoj; mano en mano kun la viroj ni helpu renversi la nunan kapitalistan sociordon kaj, por atingi nian ekonomian sendependecon, — jen politikaj taskoj por emancipemaj virinoj. La kaŭzo de malrapida progreso en la virina movado ne sin kaŝas en la edzinemo de la virinoj, sed en nia pasiveco rilate propagandon, agitadon. Ni vekigu la klaskonscion ĉe niaj samseksanoj kaj tiel ni povas esti ĉu bonaj mastrinoj, ĉu edzinoj, tamen emancipemaj, pioniroj de virinmovado, ĉar por emancipiĝi, ne sufiĉas forĵeti niajn biologie altruditajn virinajn ecojn. Se ni ja tiel volus emancipiĝi, *ni devas ĉesi esti virino,* aŭ ni fariĝus ridindaj figuroj de morala hermafroditeco.

W. M. 1311.



Ĉu utopio? . . .

EN JARO 2000

En nuna jaro la tuta mondo solenis la 100-jaran datrevenon de l' naskiĝo de fama kemiisto Marcelin Berthelot. La plej interesaj el liaj laboroj estis la efektivigitaj de li sintezoj de organaj kunmetaĵoj el malorganaj korpoj aŭ eĉ elementoj. Ĝuste tiuj ĉi esplorlaboroj pensigis lin pri la bela bildo de estonteco, kiun li majstre pentris dum unu el siaj paroladoj. Ni citas ĉi sube kelkajn plej interesajn pecojn el ĝi.

. . . Ofte oni parolis pri la stato de l' estonta socio; miavice mi volas imagi al mi la homaron tia, kia ĝi estos en jaro 2000, certe je pure kemia vidpunkto; ni parolas ja nur pri kemio.

. . . Venos tago, kiam ĉiu bezonos por sia nutro nur malgrandan azotitan sinteze preparitan grajnon, peceton da grasaĵo, sukerpecon kaj boteleton da aromaj spicaĵoj preparitaj laŭ lia persona gusto. Ĉio ĉi estos preparata malmultekoste, en senlima kvanto per niaj fabrikoj. La produktado dependos nek de la tempoj de jaro, nek de pluvo, nek de sekeco, nek de varmego, nek de malvarmego, kiuj ruinigas la nunajn terkulturistojn. Ĉio ĉi, finfine, estos tute senigita de malsanigaj mikroboj, tiuj malamikoj de la homo kaj kaŭzantoj de epidemioj.

Kiam tiu ĉi tago venos, kemio estos farinta grandegan revolucion, kies sekvojn neniu povas ankoraŭ klare antaŭvidi. Tiam malaperos la kampoj kovritaj per sekaloj, la vinberejoj, la paŝtejoj. La homa moralo atingos pli altan nivelon, ĉar la homo ne vivos plu dank'al mortigo de vivantaj estaĵoj.

Ne estos plu distingataj regionoj fruktodonaj kaj malfruktodonaj. Eble eĉ la nunaj sablaj dezertoj iĝos preferita loĝloko de l' estonta homaro, ĉar ili estos pli sanecaj ol la marĉaj ebenaĵoj grasigitaj per putraĵoj, en kiuj oni nun kulturas teron.

Ne kredu, ke en tiu ĉi universala regno de kemio malaperos la arto, la beleco, la ĉarmo de la homa vivo. Male! Se la tersurfaco ne estos plu utiligata por terkulturado, ne estos plu (ni diru tion mallaŭte, sed sincere) malbeligata per geometriaj laboroj, — ĝi kovriĝos tiam floroj, per verdaĵo, per arbaroj. La tuta tero fariĝos tiam vasta ĝardeno, akvumata per subteraj fontoj, en kiu la homaro vivos en abundeco kaj ĝojo de la legenda "ora jarcento" . . .

Bela bildo, ĉu ne? . . . Sed la fama kemiisto ja konsideras la problemon je nura kemia vidpunkto. Ni ja bone scias, ke *sole kemia* revolucio ne paradizigos ankoraŭ la teron . . . Nur man-ĉe-mana kunlaboro de faktoroj ekonomiaj kaj de scienco kaj tekniko povos realigi la revon de la mortinta scienculo.

W.-Y. X.

Korektoj

Ni esperas, ke niaj legantoj mem korektis kelkajn malgravajn preseraroĵn en n-o 140 de Sennaciulo. *Ni tamen atentigas ilin pri jenaj malpli malgravaj korektindaĵoj:*

Pĝ. 4, dua kolono, komenco de antaŭlasta alineo: anstataŭ *incidento* (nefundamenta vorto), devas esti *disputetoj.*

Pĝ. 4, tria kolono, 28-a linio: anstataŭ la *redakcio estis okupita,* devas esti *la redaktejo estis okupita* (redakcio signifas ja "redaktantaro").

Pĝ. 8, unua kolono, recenzo pri "Mirigaj aventuroj de barono Münchhausen": en la frazo *ne ĉiam la tradukinto malkonkordigas* . . . estas forgesita la vorto *ĝuste,* kio tute ŝanĝas la sencon; devas esti: *ne ĉiam la tradukinto ĝuste malkonkordigas* . . .

. . . *Erare humanum est* . . .

Ĉiu klera aŭ kleriĝema homo ne povas ne studi la ideojn de *N. Lenin.*

Tial ĉiuj esperantistoj, ĉu amikoj ĉu malamikoj de la gvidinto de l' sovetia revolucio, devas nepre havigi al si la verkon:

ŜTATO KAJ REVOLUCIO

tradukita el la rusa lingvo
de *G. Demidjuk*

Formato 18×12, 150 paĝoj. Prezo: 1 gm.

Mendu senprokraste al **Adm. de SAT., Colmstr. 1-III-Leipzig O-27.**

TRA ESPERANTIO

Ĉu propra entrepreno?

Jes! Ĉar estas absolute necese utiligi fine la monon ŝparotan per propra presejo, por la esperanto-evoluo, — por SAT.

Pripensante la fakton, ke dum eksterordinara Kongreso de LEA, dum pasko 1927, estis decidite de la delegitaro, ke parte oni presigu niajn presaĵojn en soc.-demokrata, parte en komunista presejo, — oni konkludas, ke preferinde estus decidi: "Ĉiujn presaĵojn oni presu laŭeble en esperantista presejo, kondiĉe, ke LEA-kaso ricevu sufiĉe da elcentoj pro la perado." Jen tiel la esperantistaj enkaj elspezoj konstante restus en manoj de esperantaj institucioj, por nur fine ili uzu la tiel akiritan monon propagandcele. Ĉar SAT devenas nek kapitalista, nek pure komerca organizo per starigo de propra entrepreno, oni en ĉiuj sektoroj, landoj, lokoj, grupoj devus amike akcepti ĉi tiun penson, por des pli facile ebligi la projekton de E. K. Ŝajnas, ke per efektivigo de ĉio dirita, la frata, harmonia kunlaborado inter ĉiaj naciaj organizoj kaj SAT kondukas unuflanke al estonta granda entrepreno esperantista kaj aliflanke al morala fortiĝo de Proletaro esperantista.

Se la tuta SAT-anaro serioze okupiĝos pri ĉi demando, troviĝanta en la alvoko de E. K., mi estas konvinkita, ke la projekto facile estos realigebla. Tamen, 12 000 ĝis 15 000 mk. g. estas respektinda sumo. Estas eble tamen, malgraŭ la mizera situacio de Proletaro ĉiulanda, ke nia membraro per vigla laboro post ne longa tempo povos kolekti per listoj, per iaj eldonotaj akcioj tiom da mono, ke ĝi jam sufiĉos por komenci la efektivigon de la plano. Se ĉiu SAT-ano donus nur *2* ĝis 5 mk. g. (aŭ la saman valoron en aliaj monspecoj), tiam per honesta komuna sendado al Administrejo, post *2—3* monatoj la dezirita fundamento estus preta. Mi ne volas ankoraŭ pli elsuĉi la esperantistaron, sed preskaŭ ĉiu ano havas ja okazon, hazarde, en ia feliĉa, gaja rondo neatendite kolekti kelkajn rublojn, guldenojn, markojn, dolarojn ktp. La 8% rento, promesita de E. K. tiamaniere estus kune kun la komplika kalkulproblemo solvita.

Ni estu nek troaj optimistoj, nek pesimistoj! Do ni estu sufiĉe kuraĝaj, por ekkapti ĉian okazon paroli pri la eksterordinara paŝo por nia bela afero. Ĉiu SAT-ano estu iomete fiera esti unu el la kunlaborantoj dum la konstruo de la tuto.

Per tiu mia demando "ĉu propra entrepreno?" mi unue intencas plifaciligi la kolektadon de la necesa mono, kaj due helpi per vojmontro la certan plifaciligon de la tuta problemo.

Do ni ne diskutu! ni agu!

En ĉiu loko, kie troviĝas SAT-anoj, la plej fidinda el ili organizu la kolektadon per stampitaj, subskribitaj kolektbiletoj; izoluloj sin turnu al la Administrejo, por per simpla procedo atingi tion, kion en kapitalista aranĝo atingas aŭ ne atingas... la sankta burokratismo.

Mehlhorn (1045).

*

El la Redaktejo

Lastatempe ni, kun bedaŭro, devis nutri nian redaktejan korbon per multaj, ofte valoraj, manuskriptoj. Tio okazis pro la malzorgemo de iliaj aŭtoroj, kiuj ne volas iel ajn helpi la laboregon de l' redaktoro. Ni ja ne ĉiam havas la tempon kopii valoran, sed fuŝe skribitan artikolon! Do la K-doj sendantaj al ni siajn artikolojn bone memoru, ke **neniu** manuskripto, el ĉiuj ĝis nun enpresitaj en S-ulo, **ne** bezonis zorgan korektadon. *Kiom ajn bona vi juĝas vian manuskripton, estu certa, ke ankoraŭ multajn korektojn ĝi bezonas. Ebligu do al ni fari tiujn korektojn sur via manuskripto mem, ne kopiante ĝin. De nun ni* nur escepte *akceptados manuskriptojn, kiuj ne plenumos jenajn*

neprajn kondiĉojn:

1. La manuskripto devas esti skribita sur unu flanko de folio.

2. Dekstre aŭ maldekstre devas resti minimume 4-centimetra marĝeno.

3. La distanco inter la linioj devas egali almenaŭ *1 centimetron. Ĉe skribmaŝina manuskripto — almenaŭ du "paŝojn" de tamburo.*

4. La skribo devas esti klara (beleco ne gravas!), ne tro granda, sed ne kunpremita.

5. La folio devas esti minimume 14 centimetrojn larĝa.

6. La papero ne devas esti inkabsorba.

Por malgrandigi nian korektlaboron, ni petas K-dojn atenti jenajn regulojn:

1. Neniam uzu "kamarado, sinjoro, Sat, Esperanto, organizaĵo, demonstracio, uzino, proletario", sed ĉiam uzu "K-do, s-ro, SAT, esperanto, organizo, manifestacio, fabriko, proleto".

2. Skribu la datojn jene: "14. 5. 1927".

3. Ne skribu la nombrojn kun interpunktoj (1.273.426), sed nur lasante malgrandan distancon antaŭ ĉiu tricifera grupo (1 273 426).

4. Relegu vian manuskripton antaŭ ol sendi ĝin... kaj laŭeble respektu la fundamentajn gramatikon kaj vortaron.

Iom da zorgo viaflanke rezultigos grandan ŝparon da tempo kaj energio por la redakcio kaj plicertigos la aperon de via manuskripto. Ĉu restos senefika nia peto?... *La Redakcio.*

Jubileo-Ĉeno[1])

Champion (Buenos-Aires) 2,50 pesos, alvokas la SAT-anojn en Lyon, Belle (Romans), Ferrero (Marseille); **Povarov** (Krasnoufimsk) 1 rubl., alvokas Gorbunova (Krasnoufimsk), Sizov (Kungur); **Vofimin** (Krasnoufimsk) 1 rubl., alvokas Novokreŝĉenov, Rod (Krasnoufimsk); **Fedjancev** (Niĵni-Novgorod-Miza) 1 rubl., laŭ alvoko de Zaĥariĉev, invitas Ritapeĉki (Deliblato), Smolarek (Lodz); **Babina** (Niĵni-Novgorod-Miza) 1 rubl., laŭ alvoko de Zaĥariĉev, invitas Riegel (Mainz) k. Herbst (Hannover); **Krilova** (Niĵni-Novgorod-Miza) 1 rubl., laŭ alvoko de Piskunov, invitas Zavodskij Komitet Telefon Zavoda im. V. I. Lenina (Uzinkomitaton) k. K-dinon Celovalnikova (Niĵni-Novgorod-Miza); **Ullmann** (Essen) 1,50 mk. g. kiel duan ĉeneron; **Starr** (London) 2/- ŝil., laŭ alvoko de Konovalov (Niĵni-Novgorod); **Wernicke** (Leipzig) 2,05 mk. g.

*

NIA POŜTO

1130. — Via artikolo estas eble interesa — sed tute nelegebla. Sekve ... *Red.*

Kolektivano. — Manuskriptojn skribitajn sur ambaŭ flankoj de l' folioj ni ne povas uzi. *Red.*

3717. — Alvenis viaj sendaĵoj; aperos ili se estas loko; ni preferas pli mallongajn artikolojn. *Red.*

E. T. (Lodz). — La decidoj de niaj kongresoj malpermesas, ke ni publikigu artikolojn, kiuj entenas insultojn kontraŭ iuj laboristaj partioj. — Ne necesas, ke vi traduku la materialon, kiun vi sendas por la "Memornoto". *Red.*

3018. — Daŭrigu sendi artikolojn sammaniere; sed lasu interlinian distancon! *Red.*

5913. — Ŝajnas, ke K-do Burda ankoraŭ vivas, ĉar ni sendas Senn. al li.

Georgiev-Aitos. — Tiajn anoncojn ni ne akceptas. La monon ni kreditis al vi. *Adm.*

✯ DIVERSAĴOJ ✯

PER KELKAJ VORTOJ

* Praktika eluzo de esp. estas la plej bona ĝia propagando! En nia klubo ekzistas rondetoj: kooperacia, sindikata, sporta, muzika, de ŝak- kaj dam-ludantoj, foto-, kino- kaj radio-rondetoj, kontraŭreligia, drama, de politika aboco, de grafikaj artoj k. a. En la menciitaj rondetoj partoprenas ĉirkaŭ 2 000 klubanoj. Ĉiuj rondetoj deziras korespondi kun eksterlandaj samfakaj K-doj *pere de esp. rondeto* de la sama klubo. Helpu al nia laboro! Nia celo — esp-igi ĉiujn 2000 klubanojn! Nepra respondo! Adresu L, PK, PI ktp. jene: *Klubo de Usieviĉ,* Esperanto Rondeto, Mjasnickaja 47, *Moskvo-Centro,* USSR.

* Utilan enketon aranĝas Riga'a SAT-grupo. Ĝi petas, ke ĉiuj Gek-doj respondu, ĉu grupe, ĉu individue, la jenan demandon: "Kiel plej bone komprenigi al gelaboruloj, ke ili devas lerni la internacian lingvon?". Laŭ ĉiuj ricevitaj respondoj la Grupo kompilos artikolon, kiu estos dissendita al ĉiuj respondintoj. Tiamaniere la kolektiva sperto plej klare indikos la plej taŭgajn propagandmetodojn. Estas dezirinde, ke ankaŭ komencantaj esp-istoj respondu la demandon, ĉar ili ja plej freŝe memoras la kaŭzojn de sia esp-iĝo. La respondoj devas esti adresataj al K-do *Eduardo Karklins,* Latvio, *Riga,* Liepajas iela n-o 41, dz. 1.

[1]) Vidu n-o 100 de "Sennaciulo".

Sovetia poŝto plue uzas esperanton



Ni ricevis de K-do Sevak (Erivan) tiun ĉi ĵus eldonitan poŝtkarton, kies teksto estas presita en armena kaj esperanta lingvoj.

Urĝa peto. Oficejo de l' internacia laborista interligo en Minsk disaŭdigas ĉiusemajne perradian gazeton. Disaŭdigo ĉiam okazas lunde, je 22 h. laŭ mezeŭropa tempo sur ondlongo 500 metroj.

Gazeto daŭras 40 minutojn.

Ĉiuj eksterlandaj K-doj estas petataj nepre aŭskulti nin kaj sciigi pri aŭdebleco laŭ adreso: *Minsk, Sovetio, Universitetskaja, 16, Centra Radio-Stacio.*

Ĉiuj sendaĵoj povas esti ne afrankitaj.

4424.

Armenia Labesko. Komencis funkcii la armenia labesko, kies gvidanto estas K-do *G. Sevak*, Poŝtkesto 78, *Erivan*, Armenio, Sovetio.



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

La karto mistera, de Cleveland Moffett, elangligis Edward S. Payson. Eldonita de Brita Esperantista Asocio, London. Formato: 10×16 cm., 44 pĝ. Prezo: 1 ŝilingo + afranko.

Legante la du sensencajn rakontojn, el kiuj konsistas ĉi libreto, oni demandas sin, kiu meritas pli grandan punon: la aŭtoro, kiu skribis similan stultaĵon aŭ la tradukinto, kiu tiel senguste elektis ĝin, por konigi ĝin al la ĉion "manĝanta" esperantistaro. La lingvo estas korekta sed tute ne eleganta.

Ereto.

Kwestja Jezyka Miedzynarodowego (La problemo de lingvo internacia) de M. Trochimowski. Eldono de Polia Akademia Esperantista Societo. Varsovio. Formato: 11½×15 cm., 8 pĝ. Prezo nemontrita.

Propagandileto, netaŭga por laboristaj medioj. La aŭtoro tro teorie konsideras la problemon kaj manko da spaco lasas la argumentojn kvazaŭ nefindiritaj. *Ereto.*

Le droit syndical et le personnel des chemins de fer (La sindikata rajto kaj la fervoja oficistaro). Teksto prezentita de la Internacia Transportista Federacio al la X-a kunsidaro de la Internacia Kongreso de Laboro. Amsterdam. Formato: 16×25 cm., 77 pĝ. Prezo nemontrita.

Tiu ĉi luksa libro, lukse presita sur luksa papero, devis certe elspezigi konsiderindan monsumon el la kaso de la Int. Transportista Federacio. La teksto mem okupas nur 11 paĝojn, sed ... ĝi estas presita kvinlingve (france, angle, germane, hispane kaj svede). Kia misuzo de tempo, papero kaj energio!... K-do Nathans, vi estas ja esperantisto, do...

Ereto.

Esperantaj katalogoj de biciklofabriko Sigurd, albumfabriko Schäffels, sanigpreparata fabriko Bombastus.

Tiujn ĉi bele aranĝitajn katalogojn senpage sendas la Esperanto komercista grupo en Dresden.

K·O·R·E·S·P·O·N·D·A·D·O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, k. ĉ. l. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Belgio.

K-do *Gerard Debrouwere,* Aelbekesteenweg, 18, *Kortrijk,* dez. interŝ. belajn PI, nepre bfl. por kolektaro. Nur kun seriozuloj.

— Tramistoj Atentu! 45 tramistoj, lernantaj esp. dez. koresp. k. ĉiul. samprofesianoj. Adr.: K-do *J. Lebacq,* Esperanta Kurso, Maison Syndicale 17, Rue du Poinçon, *Bruxelles.*

Bulgario.

K-do *St. Maserov,* "F. Antonov, n-o 39" *Sevlievo,* dez. koresp. k. ĉ. l. pri hommastrado k. a. temoj. L, PK, PI. Ĉiam resp.

Ĉekoslovakio.

K-do *Fritz Bittner,* Gablerstr. 152, *Grottau,* dez. koresp. k. ĉ. l. Resp. garantiata.

Ĉinio.

K-do *Morinobu Uĉikura,* c/o the Yokohama Specie Bank, *Kaijuan,* (Manĉurio) dez. koresp. k. ĉ. l. L, PI, pri literaturaj temoj.

Germanio.

— SAT-rondo de Elberfeld dez. koresp. kun eksterl. SAT-rondoj aŭ a. esp. grupoj pri diversspecialaj temoj, nur L, k. ĉ. l. Adr.: K-do *Artur Herweg,* Ottenbrucher Str. 10, *Elberfeld.*

K-do *Georg Stumpfegger, Salzburghofen n-o 51½ ap. Freilassing,* interŝanĝas PM. k. ĉ. l. Resp. garantiata.

K-do *Jakob Krieg,* Alsenstr. 4, *Barmen,* dez. koresp. L, PI, bfl. pri ĉ. temoj, k. ĉ. l.

K-do *Artur Herweg,* Ottenbrucher Str. 10, *Elberfeld,* (fotografanto) dez. koresp. k. ĉ. l. precipe pri movado de nudkulturo (nudkorpa sportado), interŝ. fot-aĵojn pri ĉi-movado. Skribu multnombre! Resp. garantiata.

Sovet-Unio.

— Metalistoj de Sebast. haveno dez. kor. kun metal. ĉ. l. indiv. kaj kol. Adr.: *Sebastopolo,* str. de Trockij, 30, *Sekcio por Int. Koresp.*

— Laboristoj de grandega ŝipkonstrua fabriko dez. kor. kun K-doj ĉ. l., nepre resp. Adr.: *Sebastopolo,* str. de Trockij, 30, *Sekcio por lab. kor.*

— Gelernantoj de regnaj esp. kursoj elem. kaj pedag. grup. dez. kor. k. ĉ. l. Adr.: *Sebastopolo* str. de Trockij 29, 1 K-dino *S. Lesiĉnik* — kursestro.

K-dino *Ida Lesiĉnik,* str. de Trockij, 29, 1 *Sebastopolo,* dez. kor. k. ĉ. l. pri soc. temoj k. a.

K-do *Tarnovskij,* Esperanto, *Kremenĉug,* dez. koresp. k. ĉ. l. pri politika movado k. turismo. Resp. garantiata.

K-do *Georgo Ĉernenko,* Pervomajska, 14, *Kremenĉug,* (j. fervojlaboristo) pri ĉ. temoj k. ĉ. l., L, PK, PI, gaz. Resp. garantiata.

K-do *A. P. Lanovenko,* Kaŝperovski sah. zavod, P. O. *Tetiev,* Kiev. gub., dez. koresp. k. ĉ. l. L, PK, skribu multnombre. Resp. garantiata.

— Gejunularo de Jakovleviĉa drapa fabriko, dez. koresp. kun alil. junularo pri div. demandoj. Nepre resp. Adr.: *Komsomola, P O Jakovleviĉi* Orŝansk. okr. (Blankrusio).

K-do *M. S. Ŝarafan, st. Novominskaja,* Donskogo okr., dez. koresp. k. ĉ. l.

K-do *Ĵeleznjakov,* poŝtkesto, 174, *Sverdlovsk,* petas pardonon pro nerespondo al siaj koresp-antoj, post du semajnoj mi nepre akurate resp. Granda laboro okaze de I Urallanda Konferenco kaŭzis la prokraston.

K-do *Pravdin,* Sovetskaja 63, *Minsk,* (gvidanto de la faka "Laborista Vivo" en la gazeto "Zvezda"), dez. koresp. k. ĵurnalistoj. Materialo estos presata en la gazeto.

— Kiu dez. koresp. pri div. diversaĵoj skribu al K-do *E. Ĉiĥaĉov,* Vasilevskaja, 33, I., *Kamenskoje,* Dnepr. okr.

K-do *N. Braginskij,* poŝtkesto, 4, *Kamenskoje,* Dnepr. okr., dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. Resp. garantiata.

— *Muldistoj!* Skribu al K-do *E. Ĉiĥaĉov,* Vasilevskaja, 33, I., *Kamenskoje,* Dnepr. okr.

Abontarifo al Sennaciulo: (La unua nombro montras jarabonon por membroj de SAT, la dua en krampoj montras la jarabonon por nemembroj. Ni ankaŭ akceptas ¼-jaran abonon.)
Argentino, pes. 5 (6); Aŭstrio, ŝil. 10 (12); Belgio, belgo 10 (12); Brazilio, milrejs. 15 (18); Britio, ŝil. 8 (9); Bulgario, lev. 200 (250); Ĉekoslovakio, kr. 50 (60); Danio, kr. 8 (10); Estonio, mk. 700 (800); Finnlando, mk. 70 (80); Francio, fr. 35 (40); Germanio, mk. 8 (9); Hispanio, pes. 10 (12); Hungario, peng. 8 (10); Italio, lir. 40 (45); Japanio, jen. 4 (5); Jugoslavio, din. 100 (120); Latvio, lat. 8 (10); Litovio, lid. 15 (20); Nederlando, guld. 5 (6); Norvegio, kr. 8 (9); Polio, zlot. 12 (15); Portugalio, esk. 35 (40); Rumanio, lej. 300 (350); Sovetio, rubl. 4 (4,50); Svedio, kr. 8 (9); Svisio, fr. 10 (12); Usono, dol. 2 (2,50). — Ponumera prezo estas: 0,20 mk. g. = 0,25 fr. svis.
Pagu prefere per ŝtataj monbiletoj en registrita letero. La germanianoj pagu al poŝtĉeka konto de la Administranto n-o 6835.
La abono validas nur post pago kaj povas komenciĝi kun ĉiu numero.

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)